



# espéranto

## Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

n° 108 - printempo 2017

### federacia retejo

[www.esperanto-provence.org](http://www.esperanto-provence.org)

### nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

### prezidanto

Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

### baza kotizo por aliĝo (kun la gazeto) : 6€

ĉeko al :  
"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la **kasisto**  
Nicole Lafitte  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

### sekretario

### redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain  
61 Montée du Castelar  
83460 Taradeau  
06 42 19 68 51  
[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

### limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° 30-a de junio 2017

bonvolu sendi al la supra retadreso

><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

### Vorto de la Prezidanto

Pro la 100-a mortodatreveno de la iniciatinto de nia lingvo, 2017 estas *Zamenhof*-jaro. Ĝi estas ankaŭ, en sia unua duono, la Jaro de la Lernanto. Ĉu nia federacio kaj ĝiaj kluboj planis agadojn rilate tiujn eventojn ? Je la 4-a paĝo de tiu-ĉi gazeto, vi povos legi pri serio da radio-elsendoj, kiuj memorigas pri *Zamenhof*. Plie, se ni agos eble ne multe pli ol kutime, plej gravas, ke tutcerte ne estos malpli ! Okazis ja, en la unuaj semajnoj de la nuna jaro, prelegturneo de eksterlanda samideano kaj sukcesa Esperanto-semajno. Okazos ankaŭ i.a. FEI-ekzamensesio, diversaj klubaj aranĝoj kaj nia tradicia novembra staĝo en *Le Beausset*. Cetere, en la ĵus okazinta membrokunveno de *Espéranto-Provence* en *Les Issambres* estis aprobata riĉenhava agadraporto de la pasinta jaro. Tie ni estis sufiĉe multnombraj kaj pozitive parolis pri nia asocio. Ni eĉ sukcesis fortigi nian komitaton per la alekto de nia amiko *Marc Gallardo*. Bonvenon al li kaj bonan laboron al ĉiuj !

*Pierre Oliva*



Organizajo de  
la Unuiĝintaj  
Nacioj por Edukado,  
Scienco kaj Kulturo

### La 100<sup>a</sup> mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof

Solenata sub la aŭspicio de UNESKO

*por scii pli pri Zamenhof kaj Esperanto, estas tre bone farita TTT-ejo,  
ege konsilinda. Ĉar ĝi estas multlingva, vi povos elekti Esperanton, la  
francan aŭ plurajn aliajn lingvojn : [zamenhof.life](http://zamenhof.life)*

### Federacia agado

#### La 5-an de marto, okazis en Les Issambres la Ĝenerala membro-kunveno de nia federacio.

Ĉiu el vi, kiu disponas pri retadreso, ricevis la protokolon de la kunveno. Se vi ne uzas komputilon kaj ŝatus ricevi paperan version de tiu protokolo, ne hezitu tion peti de la federacia sekretario.  
*(kontaktindikoj en la apuda kolofono)*

**Ĉu vi ne forgesis pagi la aliĝkotizon al Espéranto-Provence por 2017 ?  
Se tiel estas, bonvolu tuj sendi 6 € al Nicole Lafitte.  
(adreso en la apuda kolofono) - Dankon !**

## El la regionaj asocioj



### 04 - E.K.E.M.

#### Esperanta Kulturo en Manosque

#### "Ĉe ni en Provenco" - Ŝtonoj truitaj

Se vi deziras konatigi kuriozaĵon (humuraĵon, ŝercon, eksterordinaraĵon k.t.p.) el via regiono, bonvolu sendi al ni, sub formo de dokumento simila al la nia (*sube*), tra la reto al la jena adreso :

esperantomanosque@gmail.com

Se la diverslandaj respondoj estos sufiĉe multaj, ni ekspozicios ilin por montri al la publiko la diversecon de la internaciaj rilatoj per Esperanto. Ni dissendos al ĉiuj partoprenintoj la ricevitajn korespondaĵojn.



De la 2-a ĝis la fino de junio, ekpozicio kaj du prelegoj en *Sainte-Tulle* (04) - pli da informoj lastpaĝe en la rubriko "A noter sur votre agenda".



### 05 - Espéranto-Gap



Monique Arnaud plu reklamas pri la verko de Greta Franclét, kiu entenas kelkajn paĝojn pri Esperanto : "Nul en langues ? Plus jamais !" (Ed. Carrefour du Net)

#### Internacia pedagogia Film-Festivalo lanĉita de ILEI

La filmistoj devas uzi nur Esperanton, neesperantistoj rajtas partopreni sed devas elturniĝi por meti Esperantajn vortojn. 2 kategorioj :

- unuminutaj filmoj pri iu aspekto de Esperanto
- triminutaj filmoj pri harmonia kunvivado inter kulturoj.

ĉiuj informoj ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info)



### 13 - Espéranto - La Ciotat

La 18-an de januaro, antaŭ gustumado de la reĝa kuko, okazis la membro-kunveno de nia klubo.

Sezona malsano retenis kelkajn hejme ! La grupo ĉefe suferas pro manko de novaj homoj, kvankam ĝi estas bone konsiderata en la urbo kaj organizas interesajn aranĝojn.

#### Journée Internationale de la Langue Maternelle

L'UNESCO a tiré la sonnette d'alarme il y a quelques années : 4 langues sur 10 sont menacées de disparition. Langues parlées par des peuples autochtones, elles disparaissent peu à peu quand meurent les derniers locuteurs. Aujourd'hui, tous les quinze jours, une langue disparaît, souvent avant que les linguistes

l'aient étudiée. A ce rythme, 90% des langues auront disparu avant la fin du XXIème siècle, puisque 9% sont en voie d'extinction et 17% sont en danger.

Les Provençaux sont particulièrement sensibles à ce phénomène car ils ont eu des grands-parents qui parlaient provençal et la langue a disparu sous leurs yeux. Trois générations suffisent : la langue est parlée par les enfants mais restreinte à certains domaines (avec l'école de Jules Ferry, le provençal se cantonne aux travaux des champs), puis elle n'est plus apprise comme langue maternelle ; parlée par les grands-parents et comprise par les parents, elle s'éteint quand seuls les grands-parents la parlent. C'est par exemple le cas de 64 langues en Colombie !

Lors de la soirée au Grand Portique organisée le 20 février par Espéranto-La Ciotat, une discussion très animée a suivi : une jeune Vietnamiennne, issue des boat-people dans les années 80, un vieil Italien, un franco-africain ont fait part de leur expérience et du choix de leurs parents de transmettre ou non leur langue maternelle.

tago de la  
gepatra  
lingvo  
en La Ciotat



### Pourquoi l'espéranto se mobilise-t-il pour la défense des langues maternelles ?

Car toutes les langues représentent une vision du monde et participent à la diversité.

### Internacia tago de la virinoj

*Espéranto-La Ciotat* partoprenis tiun jaran aranĝon kaj estis, kun Amnestio Internacia kaj *Femmes Solidaires*, prezentanto de ekspozicio.



en la Domo de Ĝemeliĝo :  
budo de *Espéranto-La Ciotat*

### Prelegturneo de Duncan Charters

*Duncan Charters* [ndlr : *Usonano, instruisto de Esperanto kaj iama prezidanto de la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj*] jam malkovris Provencon, kiam li estis lerneano okaze de interŝanĝo kun *Lycée Mignet* en *Aix-en-Provence*. Sed de tiam li ne revenis al nia regiono. Male al kelkaj vizitantoj, kiuj fotas nur sin, *Duncan* fotas lokajn specifaĵojn kaj miris pri la diversaj «monumentetoj» : memortabulo por la deportitoj al koncentrejo, nomo de placo antaŭ la urbodomo pri marŝado de senlaboruloj al Parizo, represo de la alvoko de Generalo *de Gaulle* la 18-an de junio 1944 ; monumento al viktimoj de asbesto (li konas la problemon, ĉar lia universitato estis varmizoligita per asbesto... ), fiskkaptista tribunalo ks.

Mais il faut communiquer, d'où l'intérêt d'une langue équitable telle que l'espéranto.



Loka ĵurnalistino de "La Provence" venis tre frue kiam ne ĉiuj estis alvenintaj.

Ĝenerale, ni petas, ke la ĉe-estantoj ion diru aŭ kantu aŭ deklamu en sia lingvo.

Ĉijare aŭdiĝis nur la vjetnama, kaj la junulino miris, ke ni ne petas tradukon sed nur plezuras aŭskulti la lingvon.

Sed la demandoj, diskutoj kaj intervenoj estis aparte interesaj, ne parolante pri la aperitivo, kiu, laŭ iu, estas ĉiam la plej riĉa kaj varia, kiam ĝin proponas *Espéranto - La Ciotat* !

Ĉar la jara temo estis "Virinoj en Eŭropa Unio", ni petis de la delegitoj de UEA sendi tradukon de la kvar vortoj "virino-viro/ knabino-knabo".

Tiel alvenis tradukoj en la 24 oficialaj lingvoj sed ankaŭ en regionaj (loka lingvo en Piemonto aŭ Triesto en Italio, ĉuvaĉo en Rusio, kataluna evidente ktp). Pro rekonstruo de la Domo de Asocioj, la aranĝo okazis merkrede la 8-an de marto posttagmeze en Domo de Ĝemeliĝo, tre bela loko, kun teraso, palm-aŭ-oranĝ-arboj sed tro izolita por ke preterpasantoj hazarde vizitu ĝin.

*Loukie, Alain* kaj *Renée* deĵoris, interparolis kun la urbestro, urbaj konsilantoj kaj reprezentantoj de asocioj. La asocio "tout visuel" filmis.



La prelego [ndlr : Pri "La "Latinos" kaj la hispana lingvo en Usono"], anoncita per gazetoj kaj elektraj surstrataj paneloj, venigis dudekon da homoj, eĉ ne ĉiujn esperantistojn. La posta aperitivo permesis konstati, ke li bone parolas france kaj povas rekte respondi al interesitoj.

pri ĉiuj okazintaĵoj en *La Ciotat* raportis *Renée Triolle*



## 13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

La 10-an de januaro, en la kursejo ĉe CIRA, *Thierry Spanjaard* enmanigis la diplomon de FEI al du klubaj lernantinoj, *Rosy Inaudi* kaj *Chantal Beaumont*, kiuj sukcese trapasis la unuagradan ekzamenon en *Marseille* okaze de la nacia kongreso de *Espéranto-France*. Ĉeestis dudeko da lokaj esperantistoj, iuj novaj, ne fizike konataj ĝis nun. Ĉar partoprenis juna Rusino, doktoriĝanta pri fiziko, kaj Ukraino, kiu vizitas sian filinon, la kunveno iĝis internacia.



*gratulojn al  
Rosy kaj Chantal !*

### Zamenhof à la radio

Si l'Assemblée Générale de l'UNESCO a inscrit parmi les personnalités à honorer en 2017 Louis-Lazare Zamenhof, il est possible d'en apprendre plus grâce à cinq émissions de radio qui lui ont été consacrées. En effet, l'association Espéranto-Marseille est intervenue sur RadioJM les dimanches de mars à 12h30 dans des séquences d'une dizaine de minutes chacune.

Le script des émissions est de Renée Triolle, la sélection musicale de Marc Gallardo alors que Rosy Inaudi et Thierry Spanjaard ont prêté leur voix. L'enregistrement a été effectué dans le studio et par les techniciens de Radio Zinzine à Aix.

Les quatre premières ont été diffusées sur RJM les dimanches 5, 12, 19 et 26 mars, à 12h30.



La dernière le sera le dimanche 23 avril, à la même heure.

Elle pourra être écoutée en direct :

- sur 90,5 Mhz à Marseille,

- sur le site web de la radio : <http://www.radiojm.fr/>

- sur son appli Android :

<http://www.radiojm.fr/appli/Radiojm.fr/apk>

Si vous désirez écouter les 5 émissions, c'est possible sur le site d'Espéranto-Marseille :

<http://esperanto.marseille.over-blog.com/2017/03/ll-zamenhof-a-la-radio.html>

Il sera aussi possible de les écouter sur le site de Radio Zinzine : [www.radiozinzineaix.org](http://www.radiozinzineaix.org)

### Enregistrement de la Méthode 11

Dans le cadre de l'édition d'une nouvelle version de la Méthode 11, utilisée pour les cours au niveau débutant par de nombreux espérantistes, des membres d'Espéranto-Marseille ont participé à l'enregistrement des dialogues et des exercices en studio à Toulouse.

**à l'initiative du projet :** Jeanne-Marie Cash

**texte original :** Edmond Ludwig, avec mises à jour de Renée Triolle, Emmanuelle Richard, Axel Rousseau

**voix :** Rikardo Cash, Flavie Audibert, Kiki Vidotto, Thierry Spanjaard, Sunjo Cash,

**enregistrement et montage :** studio de Jean-Claude Patalano

**aide :** Fred Cash

Plus d'informations sur la nouvelle Méthode 11 sur le site d'Espéranto-France : <http://esperanto-france.org/>



*Flavie  
kaj Thierry  
ŝajne ĝuas  
sian restadon  
en Tuluzo !*

*Plejparto el la supraj informoj estis plukita el la tre bone prizorgata retejo de Espéranto-Marseille (gratulojn al Thierry Spanjaard !) : <http://esperanto.marseille.over-blog.com/> Ne forgesu regule viziti ĝin.*

## "Teo kaj Amo"

*Chantal kaj Florent*, membroj de *Espéranto-Marseille* (scenaro kaj desegnoj de *Chantal Beaumont*, sono kaj muntado de *Florent Salzard* kaj muziko de *Jean-Claude Roger*) produktis filmon kadre de la konkurso "Teo kaj Amo".

Por scii pli pri tiu konkurso : <http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/filme.htm>

Eblas spekti ĉiujn filmojn prezentitajn por la konkurso ĉe :

<https://www.youtube.com/channel/UCAv49qgR311e15SY6pY7azA/videos>.

Klaku sur la butono "afiŝu pli" malsupre sur la ekrano ĝis vi trovos nian filmon, "Magia teo" ; ĝi estas facile rekonebla danke al sia afiŝo.

Kaj... ne forgesu voĉdoni por ĝi ! Sed atentu, faru tion tre rapide, ĉar la 10-a de aprilo estas la limdato.



**lastmomente : Chuck Smith, "Esperantisto de la Jaro 2015", iniciatinto de Vikipedio, Duolingo kaj Amikumu, prelegis en Marsejlo la 30-an de marto. Pri li kaj lia prelego, vi povos legi en la somera gazeto n° 109.**



### 83 - Espéranto - Le Beausset

La amika kutimo de la Reĝa Kuko kunligiĝis ĉi-jare kun alia esperantaĵo :

La 7-an de januaro, *Renée Triolle*, direktoro de la ekzamenoj de FEI, enmanigis la diplomojn al la tri lernantoj, *Colette*, *Monique* kaj *Bernard*, kiuj trapasis la unuagradan ekzamenon en *Marseille* okaze de la nacia kongreso de *Espéranto-France*. *Pierre Oliva* kaj *Nicole Lafitte* gastigis ĉirkaŭ bela kolora tablo kaj invitis ĵurnalistojn.



*gratulojn al  
Colette,  
Monique  
kaj Bernard !*

### Article de "La Provence"

Ce samedi 7 janvier 2017, le club «Espéranto – Le Beausset» a réuni une partie de ses membres pour la remise des diplômes du premier degré de la langue espéranto en présence de Madame Renée Triolle, représentante d'Espéranto-France à l'Unesco. En effet, trois élèves ont réussi brillamment ces épreuves : mesdames Colette Audoue, Monique Flory et monsieur Bernard Briançon.

Pour fêter l'événement, le club a célébré l'Epiphanie autour de la traditionnelle galette dans une ambiance amicale et joyeuse. Avec ses trois niveaux de cours, le club s'apprête à relever d'autres défis et à organiser de nombreux échanges internationaux que cette langue permet très facilement.

Lastpaĝe, en la rubriko "A noter sur votre agenda", vi povos vidi la datojn de du eventoj, kiuj okazos en *Le Beausset* : artekspozicio en septembro kaj kultura semajnfino en novembro.

*Ne forgesu tion noti en vian agendon.*



### 83 - Esperanto-Klubo Saint-Raphaël

#### Ĝenerala membro-kunveno

Estas niakluba kutimo : jarkomence, ĉi-foje la dimanĉon 29-an de januaro, membroj kaj simpatiantoj kunigigas ĉe *Monique* kaj *Laurent Prezioso* por, en amika etoso, kune frandi reĝan kukon antaŭ ol pridiskuti la pasintajn kaj venontajn eventojn de la asocio.

Ni planas alilokadon de nia tradicia printempa pikniko: laŭ propono de loka samideanino, *Paulette Chiarisoli*, ĝi okazos en *Correns* (83), ĉarma vilaĝo kies slogano estas : "1<sup>er</sup> village-bio de France"



Tri partoprenintoj sendis sian raporton pri la staĝo, tiel feliĉigante la gazetan redaktoron !

Temas pri Roselyne Favier, membro de nia federacio, Liba Gabalda, ĉeĥdevena samideanino loĝanta nun en Francio kaj Raita Pyhälä, el Finnlando.

Koran dankegon al ili !

Jen ĉi-sube la teksto de Roselyne.

La du aliaj estis senditaj PDF - forme al tiuj, kiuj ricevas la gazeton per la reto.

Se vi ne uzas komputilon sed ŝatus ricevi ambaŭ tekstojn de Liba kaj Raita, bonvolu peti ilin de la redaktoro.

# Maures - Estérel

var-maŝin  
Jeudi 9 mars 2017

## ROQUEBRUNE-SUR-ARGENS

### Douze pays esperantophones en marche aux Issambres



Ils étaient nombreux cette année encore aux Issambres.

(Photo D. G.)

Le Club Esperanto de Saint-Raphaël - Tréjus regroupait traditionnellement, et jusqu'à vendredi à l'Hotel Vaccanciel des Issambres, des esperantophiles de plusieurs pays. Cette année, au plus de la France, sont aussi représentés la Belgique, la Suisse, l'Espagne, la Grèce, la Roumanie, la République Tchèque,

la Grande-Bretagne (Pologne, l'Allemagne, la Lituanie et la Finlande).

#### Bonne ambiance

Tous ces participants, unis par la pratique de l'Espéranto, apprécient l'accueil chaleureux dans laquelle se déroulent leurs échanges en Espéranto. Francis Bernard, président

local (il y en a de nombreux) précise : « Nous avons déjà fait quatre éditions par conséquent nous sommes habitués et, si il y avait couramment l'Espéranto, ils ne sont pas aussi habitués à l'été. Donc tous les ans, nous échangeons nos connaissances en fonction d'un thème. L'après-midi, nous sommes pour des personnes

qui ont des idées innovantes. Nous représentons les échanges autour de sujets, puis il y a des ateliers de discussion de des conférences, reportages ou jeux.

Le succès de l'Espéranto, c'est que nous nous comprenons tous sans intermédiaire. L'éditeur en nous sentant d'un même peuple. »

Cento da partoprenantoj el dudek landoj ĝoje kuniĝis kaj multe interŝanĝis per la internacia lingvo.

Multaj el ili loĝis en belega hotelo, eksa palaco por geriĉuloj dum la jaroj 1930 ĝis 1960. Nun ĝi estas asocia loko, kiu nomiĝas *Vacanciel*. Tie eblas ripozi, sportumi, ludi, promeni, danci, k.t.p.

Sed la ĉefa restadkialo por la geesperantistoj estas lerni kaj paroli Esperante.

Multe da personoj estis jam spertaj, sed multe da ankoraŭ bezonis lerni.

Kvar kursoj estis proponitaj dum tiu ĉi agraba semajno :

- unu por novaj lernantoj, kun *Christine* el Francio.
- unu por bonaj progresantoj, kiuj deziris praktiki parole, kun *Nina* el Rusio.
- unu por spertiĝi gramatike, kun *Marek* el Ĉeĥio.
- unu por spertuloj, kun *Dalia* el Litovio.

Kelkaj junuloj partoprenis en la staĝo :

- *Marek* venis el Ĉeĥio kun sia edzino kaj ilia bebo *Rosaria*... certe nova Esperanta generacio !
- Ankaŭ estis *Antony*, juna Franco, kiu laboras en Londono kie, laŭ tio, kion li diris, pluraj Esperantaj grupoj renkontas ofte unu la aliajn.

Dum la paŭzoj, ni povis trinki kafon, teon... manĝi kuketojn kaj ankaŭ aĉeti, ĉe la libroservo, favorprezajn kaj ege interesajn librojn. Kelkaj el ili estis eĉ maloftaj !

Vespere ni povis aŭskulti prelegojn, ekz. pri la landoj de kelkaj el la partoprenantoj, aŭ pri la litova skribo.

Ni ankaŭ spektis mirindajn lumbildojn pri Vjetnamio.

Mi ne forgesas la ekskursojn en diversaj lokoj : ni ŝatis *Cogolin*, vilaĝon kie ni vidis historiajn lokojn kaj la ducentjaran pipfabrikon.

La lastan vesperon, ni adiaŭis per amuzaj teatraĵetoj kaj loterio. Kaj sperta muzikistino dancigis nin.

Ni nepre danku ĉiujn pro ilia afableco kaj ĉefe la georganizantojn kaj gehelpantojn.

Post tiel "riĉa" semajno, mi ankoraŭ pli deziras paroli pri Esperanto al skeptikuloj !

Roselyne Favier





## 84 - Centre Culturel Espéranto d'Avignon

Dimanĉon la 11-an de decembro 2016, okazis nia 38-a Zamenhofa tago en "Souvine". La preleganto estis Sinjoro *Hannes Larsson*, kiu naskiĝis en Finnlando.

Inĝeniero, li restadis en multaj landoj, kies lingvojn li lernis. Tute hazarde li malkovris Esperanton.

Ĉi-tage, li prelegis pri "valsoj" ; kelkaj estas fame konataj, aliaj ne, tiel ni aŭskultis kaj eĉ malkovris multajn tre belajn eltiraĵojn. Poste, "ĉerizo sur la kuko" <sup>1</sup>, Sinjoro *Larsson* aldonis la projekciadon de filmeto pri skikurado, kiun li komentis. Ne ĉiuj sportistoj kapablas plenumi tian elprovadon.

Tagmeze, ni manĝis en la restoracio de la sportcentro *Souvine* en amika etoso. Post la kafo, ĉiuj denove reiris en la ĉambron por spekti la distran programon preparitan de la klubanoj. Rakontoj kaj kantoj alternis. Ni ludis skeĉon pri iu "mirakla medalo", kiu alportas bonaĵon... sed ne por ĉiuj. Ni ludis ankaŭ teatraĵon, kiun ni tradukis el la franca, kun la afabla permeso de la aŭtoro : *Jacques Maurin*, kaj kies titolo estas: "La Brigado Anti-Teatro, Kiu Frenezigas".

Ni rendevuas vin dimanĉon la 17-an de decembro 2017 kun nova programo.

*raportis Rose-Marie Quintin*



*Hannes Larsson*



*tagmeza paŭzo*



*teatrumado*

*ndlr > <sup>1</sup> : En la teksto de Rose-Marie, mi intence lasis la esprimon "ĉerizo sur la kuko", kvankam mi havas dubojn pri ĝia internacieco. Temas pri idiomaĵo, sed ne nur francismo, ĉar ĝi ekzistas en aliaj lingvoj, ekz. : the icing on the cake, de klap op de vuurpijl, la guinda del pastel, la ciliegina sulla torta, das Sahnehäubchen auf dem Kuchen...*

*Kompreneble, en Esperanto, ni povus uzi : ĉefaĵo, plejbonaĵo, klimakso, apogeo, kulmino... sed ĉi tiuj vortoj estas malpli esprimivaj ol la ĉerizo sur la kuko.*

*Tial, mi proponas al vi lingvan ludon : ĉu vi povus trovi trafan esprimon en nia lingvo, kiu estus samtempe eleganta kaj internaciskale akceptebla ? Mi atendas viajn proponojn.*

><><>

### Plus de 300 ONG à l'Unesco pour la Conférence Internationale

[...] Tous les deux ans a lieu la Conférence Internationale des ONG (*Organisations non gouvernementales*) à l'Unesco. La dernière vient de se tenir à Paris du 12 au 14 décembre 2016. L'UEA était représentée par Renée Triolle et Sacha Kovyazina, qui faisait ses premières armes au nom de TEJO. ILEI, observateur au nom des enseignants espérantophones, était représenté par Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet et Pascale Voltaire.

Les interventions et débats se sont déroulés en anglais et en français avec la traduction assurée par les interprètes professionnels de l'Unesco. Seul un Chinois est intervenu en chinois avec traduction en anglais. [...]

Comme d'habitude, nous avons essayé d'intervenir dans les discussions, même si après 60 ans de collabo-

ration avec l'Unesco, des thèmes chers à l'UEA comme le droit à la langue, la diversité culturelle, le multilinguisme ne sont pas oubliés dans les résolutions.

La nouveauté, c'est la demande de certaines organisations pour que nous traduisions en espéranto leurs présentations ou l'accord du Comité de Liaison pour faire paraître ses résolutions ou textes importants en espéranto. Ni semas kaj semas...

*Renée Triolle, représentant de l'UEA à l'Unesco*

*L'intégralité de l'article est à lire en page 7 du n°598 de la revue "Le Monde de l'Espéranto", qu'il est désormais possible de lire ou de télécharger librement, comme tous les autres numéros de LME, sur le site d'Espéranto-France : <http://esperanto-france.org/le-monde-de-l-esperto>*



## ZEO-oj en PACA > 5 - Cannes (06) - daŭrigota

Post la ZEO-oj de Aix-en-Provence, Arles, Cagnes-sur-Mer (kie iama ZEO-o malaperis), Callian (kie ne estas vera ZEO-o, sed memoraĵoj pri fama esperantisto), jen la ZEO-oj de Cannes.

Male al tio, kio okazis kun la turismaj servoj de la kvar cititaj urboj, kie ĉiuj personoj, al kiuj mi telefonis, estis ege afablaj kaj klopodis kontentigi min, ĉifoje mi tute fiaskis en miaj petoj pri esperantaĵoj al la diversaj urbaj servoj (urbodomo, turismoficejo, arkivejo). Ŝajne, neniu vere interesiĝis pri nia ne profitdona afero.

Bonŝance, nia amiko Michel Simon, lasta prezidanto de la Eo-klubo en Cannes, disponigis al mi multajn dokumentojn pri la riĉa Esperanta vivo de sia urbo en la pasinteco. Mi kore dankegas lin !

### ZEO-oj en la nuna Cannes



strato "Rue du Dr. Zamenhof"  
kaj bushaltejo ĉe  
" Boulevard de la Croisette"




alia bushaltejo  
Zamenhof,  
ĉe kruciĝo inter  
la strato Zamenhof  
kaj "boulevard  
du Général Vautrin"...



supre kaj  
ĉi-dekstre :

Hotelo  
Espéranto  
26, avenue  
de Lattre  
de Tassigny



la strato Zamenhof  
estas preskaŭ orta  
al la fama Croisette



ne nur nia standardo verdas...  
la esperantistaro antaŭeniru !

### ZEO-oj en la pasinta Cannes



grupa fotografaĵo, okaze  
de la inaŭguro de la strato Zamenhof  
la 18-an de junio 1933



1934 : S-ro P. Faucon, esperantista policisto, delegito de la  
Internacia Polica Ligo, kun verda stelo sur maniko.



maldekstra foto : esperant-lingva indiko : "Poŝto - Telegrafo"  
dekstra foto : esperant-lingva indiko : "Jetée - "Deviga direkto"



"Lanternejoj malpermesitaj", "Halto por aŭtobusoj" "Deviga direkto", "Poŝto-Telegrafo", "Polic-ejo"... Charles Cresp, kiu jam en 1908 iniciatis la Esperanto-movadon en Cannes, sukcesis esperantigi multajn panelojn en la urbo. Pri li kaj pri la riĉa Esperanta vivo en lia urbo, mi ree parolos en la sekva gazeto, se mi havos lokon por tio.





## Senparolado

En la belega kaj pensiga lasta filmo de *Martin Scorsese*, «*Silence*», oni spektas kunparoladon inter jezuita pastro sendita al Japanio kaj loka registo, persekutanta ĉiujn kristanojn kiel subfosantojn de la imperia ordo. La pastro sin defendas dirante, ke lia kredo estas universala (t.e. tutmonda) vero, sed la japana estro malkovrigas al li ke, vere, tiu ĉi kredo nenion esprimas krom la personajn volojn kaj ambiciojn elirantajn el lia koro.

Sendube, kia ajn estas la spirita mesaĝo, se almenaŭ ĝi vere volas esti tutmonda, ĝi devas unue sin direkti al la tuta homaro kaj proponi enhavon, kiu rilatu al ĉies sperto (ekz. la ora regulo) kaj, due, uzi lingvon, kiu ne estu unu el la multaj kaj diversaj ekzistantaj idiomoj (eĉ Eŭropaj).

Cetere, tiu ĉi tutmonda mesaĝo, anstataŭ forpeli la malfeliĉajn fidelulojn al martireco kaj senutila sin-ofero, devus preferi alvoki tiujn al malebrieco, viv-simpleco, libereco, racia konduto, konfido al si mem, sendependeco, kaj, finfine, pacemo.

*Luc Barbulesco*

***Arlette Pierange, sympathisante du club de Saint-Raphaël, nous a fait parvenir cet article du quotidien Var-Matin (édition Saint-Raphaël) du 16-12-16.***

« Un Espagnol, deux Tchèques, un Danois, deux Roumains, un Biélorusse, un Serbe, un Tunisien... Si les Français y sont évidemment majoritaires, le team du SRVHB (Saint-Raphaël Var Handball) n'en est pas moins une vraie mosaïque de diverses nationalités au sein de laquelle il convient de savoir parler et se faire comprendre. **L'espéranto n'étant pas encore de mise**, le club a trouvé la parade dans ce domaine en demandant à chaque nouvelle recrue étrangère d'apprendre la langue de Molière dès son arrivée. Tous les concernés s'acquittant sans rechigner de cette formalité en suivant d'ailleurs des cours du soir. » [...]

*ndlr :*

Le rédacteur de cet article fait preuve d'optimisme en écrivant « pas encore de mise ».

Veut-il ainsi laisser supposer que ce sera un jour le cas ?

Autre point positif : les joueurs étrangers apprennent le français dès leur arrivée. Normal puisqu'ils vivront en France durant un certain temps. Mais d'autres clubs auraient pu exiger d'eux des échanges en anglais. Ouf... ils auront au moins échappé à cela !

Aux Issambres, en mars, durant la « *Mediterranea Esperanto-Semajno* », il est courant que, par exemple, un Suédois, trois Espagnols, deux Allemands, une Roumaine, deux Italiens et une majorité de Français... se parlent à bâtons rompus... et se comprennent, sans passer par des interprètes... Mais cela, vous le savez bien, puisque vous recevez ce bulletin de notre fédération...



## Esperanto en Interreto

### Ĉiuj verkoj de Zamenhof estas legeblaj en la reto

Lige al la 100-a mortodatreveno de Zamenhof, la viena Esperanto-Muzeo celis ĉi-jare prezenti ĉiujn verkojn de Ludoviko Zamenhof, aperintajn de 1887 ĝis 1930, kiuj troviĝas en ĝia kolekto.

125 libroj jam estas libere kaj senpage legeblaj en la retejo de la muzeo IEMW. Kelkaj ankoraŭ sekvas dum la venontaj semajnoj.

<https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/olekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/ludwik-l-zamenhof/>



Ĉu eblas senpage havigi al si ĉiutagan ĵurnalon en la reto ? Jes !

Legado kaj elŝutado ĉi tie :

<https://lahodiaujurnalo.wordpress.com/>



### Malgajiga novaĵo

**Rolland Accomiato**, el *La Garde*,

membro de *Esperanto-France* kaj *Esperanto-Provence*, forpasis la 15-an de marto.

La membraro de nia federacio funebras kaj kondolencas la familianojn.

## Paĝo de la komencantoj

### teksto en facila Esperanto

La dunaskitoj <sup>1</sup>

La gepatroj de iu knabo havis novajn dunaskitojn, kaj la patro diris al sia filo, ke li havas la permeson <sup>2</sup> resti hejme, kaj ke li devas diri al la instruisto, ke li havas du novajn fratojn.

"Tion mi ne faros, respondis la infano. Morgaŭ mi diros, ke mi havas nur unu novan fraton, kaj la proksiman semajnon mi diros, ke mi havas ankaŭ alian novan fraton ; tiamaniere <sup>3</sup> mi restos hejme du tagojn <sup>4</sup>."

### klarigoj / atentigoj

<sup>1</sup> : **naski** = eligi el si idon (*mettre un enfant au monde*)

"Patrino naskas bebon."

**naskiĝi** = veni en la mondon (*naître*)

"Bebo naskiĝas."

**naskito** = bebo, kiu ĵus naskiĝis  
(*bébé qui vient de naître*)

**dunaskito** / dunaskitoj = ĝemelo / ĝemeloj  
(*jumeau / jumeaux*)

<sup>2</sup> : **li havas la permeson resti hejme**

= li havas la rajton resti hejme = li rajtas resti hejme  
= li havas la eblon resti hejme = eblas al li resti hejme  
= li havas la povon resti hejme = li povas resti hejme

<sup>3</sup> : **tiamaniere** = en tia maniero = tiel  
(*ainsi, de la sorte*)

<sup>4</sup> : **mi restos du tagojn**

pourquoi un "n" à la fin du mot "tagoj" ?

> il obéit à ce principe grammatical :

*si la clarté du texte n'en souffre pas, on peut toujours remplacer une préposition par la marque "n", alors appelée "accusatif de remplacement"*

ex : mi restos **dum** du tajoj = mi restos du tagojn

ex : en Marsejlo, **je** la 19-a de marto

= en Marsejlo, la 19-**an** de marto



### Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens  
eldonitaj de *Espéranto-Info*

#### 1 - gramatika

a) Li estas la plej laborema ..... sia lernejo.

1 - en ; 2 - el ; 3 - de

b) La ..... lerta el la du manoj estas la dekstra.

1 - plej ; 2 - pli ; 3 - plu

c) Li estas tiel dika, ..... li ne povas pasi tra la pordo.

1 - kiel ; 2 - kiu ; 3 - ke

#### 2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "difekti", "falsi" aŭ "soifigi" por traduki la francan "altérer"

1 - exciter la soif : .....

2 - détériorer : .....

3 - falsifier : .....

d) elektu "allogi", "ekfunkciigi" aŭ "komenci" por traduki la francan "amorcer"

1 - un travail : .....

2 - séduire, attirer : .....

3 - une pompe : .....



### Superzam'

proponita de  
*Jean-François Cousineau*

1. En kiu urbo naskiĝis Esperanto ?

a- Bjalistoko b- Moskvo c- Varsovio

2. Kiu el la jenaj verkoj de Baghy estas poemaro ?

a- Viktimoj b- Songo sub pomarbo c- Pilgrimo

3. Kiu el tiuj kantoj de Kajto ne estas kanono ?

a- La plej bela vorto b- Hobio-profesio c- La velŝipo  
Magdalena

4. En kiu jaro naskiĝis Zamenhof ?

a- 1859 b- 1869 c- 1879

5. Kiu korelativa finaĵo signas tempon ?

a- am b- e c- om

6. Kiu estas la plej longa rivero en Ameriko ?

a- Amazono b- Misisipo c- Misuro

### Plurelekta demandaro

#### 1 - gramatika

a : 1 ; b : 3 ; 3 : 2

#### 2 - vorto-trezora

ĉ1 : interligi ; ĉ2 : alojigi ; ĉ3 : alianci

d1 : ekbruligi ; d2 : eklumigi ; d3 : ŝalti

### Solvoj de la demandoj

en EP 107

vintro 2016 / 2017

### Superzam'

1 a > Lingvo Internacia

2 a > rusa ; 3 b > Kajto

4 c > 57 ; 5 a > es

6 c > Jangzio (6380 km)



## El la mesaĝkesto de la legantaro

### **Thierry Spanjaard**

Dankegon pro tiu belega kaj kompleta bulteno de Esperanto-Provence. Mi opinias, ke listigi ĉiujn agadojn de la tuta jaro estas tute utile : tio evidentigas, ke kune ni multe faras !

Krome, kiel mi povus ne esti feliĉa legi bultenon, kie mi estas dankita je la kvara linio ?

Nur unu erareto : la retejo de Esperanto-Marseille estas ĉe <http://esperanto.marseille.over-blog.com> kun streketo inter over kaj blog. Antaŭdankon pro via korekto en la venonta eldono.

*respondo de la red.*

*Dankon pro viaj laŭdaj vortoj, Thierry ! Efektive, nia jarraporto, eĉ se ĝia legado eble estas teda, bone montras, ke nia federacio estas agema. Pri via nomo je la kvara linio, vi tion tute meritis, ĉu ne ? Kaj vi meritas ankaŭ gratulojn pro via tre atenta legado ; mi korektis la adreson de la Marsejla retejo.*

### **Flavie Wakako Audibert**

Alvenis la gazeto hodiaŭ, en malpli densa vespero ol aliaj. Foje mi ne sukcesas legi... kaj forgesas.

Mi do povis iomete tralegi la gazeton, kaj povis ĝui konstantan kvaliton. Klara kaj konciza. Gratulon pro la laboro.

Nur : kio estas ZEO ? Mi ne trovis la respondon en la artikolo pri Honoré Bourguignon... Sed eble mi tro rapide legis...

Kaj por informo (sed eble vi jam vidis ĝin), estas dua paĝa artikolo de Claude Nourmont pri la Kongreso de Marsejlo en «Le monde de l'espéranto» de novembro 2016 (transdonis ĝin mia kara japana patrino)

*respondo de la red.*

*Viaj vortoj kuraĝigas min, Flavie ! Dankon ! Pri la signifo de ZEO, mi konsilas al vi relegi la klarigon en la n° 101 (somero 2015) de nia gazeto. Se vi ne plu havas ĝin, vi povos trovi ĉiujn informojn ĉi tie :*

*[https://eo.wikipedia.org/wiki/Listo\\_de\\_Zamenhof/Esperanto-objektoj](https://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_Zamenhof/Esperanto-objektoj)*

*Kaj pri la artikolo de Claude Nourmont, mi ja vidis ĝin en «Le monde de l'espéranto»... sed forgesis menciion en nia gazeto. Peĉ !*

### **Favier Roselyne**

Dankon pro la gazeto.

*respondo de la red.*

*Ne dankinde ! Estas plezuro por mi verki ĉi tiun ligilon por ĉiuj federacianoj... kaj aliaj...*

### **Philippe Combet**

Jen kelkaj rimarkoj notitaj/notataj dum legado de EP : p. 4 manĝaĵoj (anst. manĝaĵoj) ame preparitaj ; p. 5 en la tuta Esperantio : mi skribus « en tuta Esperantio » aŭ « tra tuta Esperantio » ; p. 6 propa-ganditaj (anst. propaganditaj)

*1-a respondo de la red.*

*Ho ve ! Perfida preskoboldo denove decidis amuziĝi kun miaj tekstoj... jen foje supersigno, kiu mankas... jen foje streketo, kiu troas... kaj ĉio ĉi tamen post pluraj relegoj ! Verŝajne la koboldo vizitas la paĝojn POST la lasta kontrolo !*

*Koncerne la esprimon « tuta Esperantio », kun aŭ sen « la », mi ne akordiĝas kun vi. Kiam mi eklernis nian lingvon, mi tre ofte uzis la verkon « ABC-Gramatiko de Esperanto » de Christiane De Vleminck kaj Emile Van Damme. De tiam, mi aplikas ĉi tiun regulon (rubriko « artikolo » de la libro) : « Principe la propraj nomoj ne bezonas la artikolon, ĉar ili estas sufiĉe difinaj per si mem. Tamen, en certaj okazoj, ekz. kiam epiteto akompanas ilin [... - oni uzas la artikolon] ». Sekvas la jenaj ekzemploj : en Afriko / en la Ekvatora Afriko ; por Francujo / en la bela Francujo ; dum Ramadano / dum la lasta Ramadano*  
*Kompreneble, Philippe, mi pretas legi malan argumenton !*

Mi multe ŝatis la artikolon pri Bourguignon : admirinda viro, kiu meritas memoron inter la esperantistoj.  
*2-a respondo : mi esperas baldaŭ skribi pli longe pri li.*

Mi aldonas la jenajn reagojn :

- p. 6 La libro de Privat pri Zamenhof estas sur la reto, sur la tre bona paĝaro [gutenberg.org](http://www.gutenberg.org) : <https://www.gutenberg.org/ebooks/26359>  
Sur tiu paĝaro estas multaj interesaj libroj en Esperanto, kiujn oni laŭleĝe rajtas senpage legi kaj elŝuti.
- p. 6 : somerlernejoj antaŭ la dua mondmilito : tiu temo meritis artikolon (kiu organizis ilin, kie ili okazis...) Mi konas nenion pri tio.

*3-a respondo*

*Dankon pro la sciigo pri [gutenberg.org](http://www.gutenberg.org) ; mi esperas, ke ĝi utilis al multaj federacianoj. Pri somerlernejoj antaŭ la dua mondmilito, mi enketos.*

### **Rose-Marie Quintin**

Dankon por la bulteno. Mi printos ĝin, kaj lasos je la dispono de la klubanoj.

*respondo de la red.*

*Bona ideo ! Ĉu tio povus instigi kelkajn iĝi membroj de nia federacio ?*

### **Pierre Oliva**

Bonvolu trovi artikolon kaj foton pri diplomo transdonita al tri el niaj lernantoj. Gratulon pro la lasta gazeto.

*respondo de la red.*

*Dankon pro la ricevitaĵoj ! Se ĉiuj kluboj povus akurate kaj regule sendi publikotaĵojn, mi estus ege kontenta*



## **A noter sur votre agenda**

### **dans notre fédération**

**1<sup>er</sup> jeudi de chaque mois** : l'espéranto est parlé à l'Equitable Café, 54 Cours Julien, 13006 Marseille

**avril 23** - Marseille (13) : émission sur l'espéranto - Radio RJM

**avril 27-28** - Saint-Raphaël (83) : stand espéranto au Forum des retraités (Palais des congrès)

**mai 13** - La Ciotat (13) : journée de l'Europe - stand espéranto et concert de jOmO

**mai 21** - Marseille (13) : examens de l'Institut Français d'Espéranto - niveaux 1 et 2 (*renseignements sur demande par courriel ou tel. au secrétaire*)

**juin 2-30** - Sainte-Tulle (04) : expo "langues et espéranto" à la médiathèque

vernissage le 2 juin à 17 h puis à 18 h conférence de Monique Arnaud à partir du livre "Nul en langues ?... plus jamais !"

vendredi 16 à 18 h : conférence de Patrick Lagrange sur l'espéranto

**juin 11** : Correns (83) : pique-nique du club de Saint-Raphaël avec présentation au public de l'espéranto, initiation, expo... (*des infos plus précises vous seront envoyées par courriel*)

**juin 25** : sud du Lubéron (84) : journée culturelle et pique-nique du club d'Avignon

**juillet 2** - Gap (05) : stand espéranto à la Fête du Mouvement de la Paix

**septembre 8-15** - Le Beausset (83) : expo des peintures de Pierre Oliva sur le thème "Invitation au voyage par l'espéranto"

**septembre 9-10** - Embrun (05) : stand espéranto à la Foire Bio-génépi

**novembre 18-19** - Le Beausset (83) : fin de semaine culturelle

*kaj ne plu zorgus pri la enhavo de nia gazeto !*

### **Simon Michel**

En la gazeto 107, je la paĝo 2, linio 7, necesas legi « plie » kaj ne « prie ». Mi pardonas la redaktoron.

*respondo de la red.*

*Ej ! Kial tiu ĉi rimarko, Michel ? Mi vole elektis la vorton « prie », en la signifo « pri tio (antaŭe skribita) ». Pli precize, prie = pri la maja kongreso de Esperanto-France en Marsejlo. Dankon, tamen, pro via pardono !*

### **en France**

**avril 15-18** - Saint-Sébastien-sur-Loire (44) : 69<sup>ème</sup> congrès de SAT-Amikaro



[kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

**mai 16-23** - Colmar (68) : 69<sup>ème</sup> congrès de la fédération internationale espéranto des cheminots (IFEFF)

<http://ifef.free.fr>

**mai 25-28** - Mandres-les-Roses (94) : Congrès d'Espéranto-France

<http://esperanto.paris/congres-esperanto-france-2017>

**août 14-20** - Plouezec (22) : 21<sup>èmes</sup> rencontres internationales - reyssetplouezec@hotmail.fr

### **en Europe**

**août 26 / septembre 2** - Heraclea (Matera - Italie) : 84<sup>ème</sup> Congrès italien d'espéranto

<http://kongreso.esperanto.it/84/>

### **ailleurs dans le monde**

**juillet 22-29** - Séoul (Corée du Sud) : 102<sup>ème</sup> Congrès mondial d'espéranto

<http://www.uea.org/kongresoj/>

**juillet 29 / août 5** - Séoul (Corée du Sud) : 90<sup>ème</sup> Congrès de SAT - <http://sat90.org/>